


Voludi



Prezento	2
Vortaro.	3
Krucvortludo:	4
Ludo: Rubik's Kubo.	5
Papago (Papagajo)	6
Babilo	7
Utilaj Esperantaj ligiloj:	8
Konkludoj	9
Aldonaĵoj	9

Prezento

La app VOLUDI estas eksperimento, kiu kombinas Ludojn, Vortarojn, Artefaritan Inteligentecon kaj Voĉon por igi facila kaj amuza lerni Esperanton.



VOLUDI naskiĝis el la ideo fari multlingvan vortaran programon por esperantistoj, kaj por fari ĝin amuza, estis aldonitaj plurlingvaj krucvortludojn, kiuj estas hazarde generitaj laŭ la nivelo de la ludanto.

Ĝi ankaŭ integras "malfermajn" tradukilojn kaj aliajn utilajn ligilojn.

Poste aldoniĝis voĉaj iloj, precipe fokusitaj al Esperanto kiuj, konektante kun la tradukiloj, ebligas samtempajn tradukojn de voĉo al Esperanto kaj inverse.

Nuntempe okazas "eksplodo" de iloj de Artefarita Inteligenteco kiel Chat-GPT, LLama,... Per VOLUDI ni povas paroli kun ili en Esperanto.


La tuja estonteco estas markita laŭ AI. Nia ideo estas uzi nur malfermitajn ilojn instaleblajn sur simpla aparato kaj kiuj postulas minimuman interretan konekton.

Vortaro.

La unua funkcio estas la vortaro. Per ĝi, skribante vorton en iu ajn lingvo, ĝi informas vin pri la traduko, pri la difino en Esperanto kaj en aliaj lingvoj aŭ inverse. Donante ekzemplojn de uzado.



Oni povas specifi la serĉlingvon, por komenci la serĉadon en tiu lingvo.

Oni ankaŭ povas specifi, ĉu la serĉo estas de la unua litero de la vortoj aŭ ne.



Krucvortludo:

La krucvortenigmoj estas generitaj hazarde, krucante vortojn de la vortaro. Ekzistas pluraj niveloj de malfacileco por adaptiĝi al la nivelo de la uzanto.



Je la plej facila nivelo, la vortaro krucas Esperantajn vortojn (verda koloro) kun ilia traduko en la hispana aŭ la lingvo elektita (blua koloro), kaj proponas malsamajn literojn por ĉiu kvadrato


Se la litero estas ĝusta vi gajnas poenton, se vi maltrafas ĝin vi perdas poenton. Oni povas peti helpon kaj enigi la ĝustan literon premante (ĉ), sed vi perdas du poentojn. La ludo finiĝas kiam vi perdas ĉiujn poentojn aŭ kiam vi kompletigas ĉiujn leterojn kaj sukcesas

La meza nivelo estas simila, sed la vortoj aperas en la hispana (aŭ la elektita lingvo) kaj la ludo konsistas el serĉi la vortojn en Esperanto


La plej alta nivelo funkcias per vortoj nur en esperanto, kun ilia difino. Sed tio malfacilas por komencantoj kaj nia intenco estas ke ĝi povu esti uzata de Esperanto-lernantoj. Pro tio, la diversaj ludniveloj

Ludo: Rubik's Kubo.

Ludu solvi la Rubik-kubon dum studado de Esperantaj pronomoj.




La koloroj respondas al la grupoj de pronomoj en Esperanto kaj ilia traduko.



Papago (Papagajo)

Voĉaj utilecoj permesas paroli en pluraj lingvoj, aŭtomate traduki kaj aŭdi kiel ĝi sonas en Esperanto. Por tio, oni devas alklaki la bildon de la infano



Ĝi povas esti uzata kiel tradukilo, por konservi notojn, por sendi mesaĝojn per WhatsApp, aŭ simple por eksperimenti per parolrekono en malsamaj lingvoj.

Sanĝante la agordon oni povas uzi ĝin parolante en aliaj lingvoj

Babilo

Permesas al vi babilo kun AI, (aŭ kun alia uzanto de Voludi).

Oni povas skribi aŭ paroli en diversaj lingvoj, sed ĝi havas specialan Esperanto-subtenon.





Ĉi tiu opcio estas ankoraŭ disvolvanta kaj pro tio limigita al registritaj uzantoj, ĉar ili povas postuli aldonan koston por la uzo de AI.

La intenco estas uzi plurajn servilojn, kun malfermitaj iloj por provizi distribuitan subtenon al la projekto.

Utilaj Esperantaj ligiloj:

Projektoj rilataj al Esperanto, vortaroj, kursoj, ludoj... Aliru ilin facile. Ĝi estas speco de projektvortaro rilate al Esperanto.



Konkludoj

La eksperimento enhavas plurajn celojn kaj flankojn.

La unua estas, ke ĝi estu utila ilo por esperantistoj, speciale se ili studas la lingvon, sed ĝi ankaŭ povas esti amuza se vi estas spertulo.

Alia aspekto de la eksperimento estas “pura komputiko”. La intenco temas pri farado de plurplatforma aplikaĵo. Komence por Android, Vindozo kaj Linukso, kaj ke ĝi eksperimentu per lingvo, voĉo kaj Artefarita Inteligenteco.

Estonta celo estas havi kunlaboran retejon kiun subtenas aplikaĵojn kaj kiu povas esti rizorgata komunume, ekzemple por konservi korektitajn la vortarojn. Kaj ke ĝi akceptu registritajn uzantojn kiujn volas havi la programojn ĝisdatitaj.

Laste sed ne balaste, koni kaj utiligi aliajn malfermitajn projektojn, kiujn rilatas al Esperanto, kaj serĉante la manieron interagi kun ili.